# Someraj Esperanto-programoj

2017

# La 102-a
# Universala Kongreso
# de Esperanto
# Korea Respubliko,
# Seulo

# 22 — 29 de julio 2017

# Ĝenerala temo de la Kongreso

## Turismo kaj evoluo: vojoj al daŭripovo.


**Tiun elekton inspiris la decido de Unuiĝintaj Nacioj (UN), nomi la jaron 2017 la Internacia Jaro de Daŭripova Turismo por Evoluigo.**

Nia movado konsistas el homoj scivolemaj pri aliaj landoj kaj kulturoj, kiuj volas renkonti la lokanojn en rilatoj de egaleco. Tio estas jam valorega kontribuo al la koncepto pri daŭripova turismo. Ni povus tamen fari multe pli por disvolvi la edukan kaj medikonscian flankojn de la turismo en Esperanto. Mi esperas, ke la kongreso en Seulo helpos inspiri novajn ideojn kaj novajn iniciatojn sur tiu kampo.

Mark Fettes, Prezidanto de UEA

# Seulo, la ĉefurbo de Koreio









# Seulo, la ĉefurbo de Koreio







# Seulo,
# la ĉefurbo de Koreio






# Emblemo de UK-102

UK okazos en la urbo,
kie historio, tradicio, kulturo
kaj alta tekniko kunekzistas.
La palaco Gyeongbok montras
historion kaj estontecon.
La lingvo, kiu unuigas la mondon,
Esperanto fariĝos unu sola komuna
lingvo ĉi tie.
Grandega festivalo okazos.
Super la festivalo, leviĝas ĉielarko,
kiu enhavas ĉiajn kolorojn.

102-a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO
SEULO 22-29 JULIO 2017

# Kongresejo – Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj



# Laŭtaga programo de UK-102

**Sabato, 22 julio** Malfermo de la kongresejo je 9h00. Alveno de la kongresanoj kaj registriĝo. Disdonado de dokumentoj. Komitato de UEA. Unuafojaj Kongresanoj. Libroservo. Movada Foiro/Interkona Vespero. Giĉetoj funkcias ĝis 18h00.

**Dimanĉo, 23 julio** Solena Inaŭguro (10h00). Libroservo. Inaŭguro de IKU/ AIS. Kongresa Temo. E-kursoj. Korea Ekspresе. Nacia Vespero.

**Lundo, 24 julio** Libroservo. IKU- prelegoj. E-kursoj. Kleriga Lundo. Korea ekspresе. Teatro. Bankedo. Kongresa Balo.

**Mardo, 25 julio** Libroservo. E-kursoj. Tago de Lernado. IKU-prelegoj. Kon- gresa Temo. Estraro respondas. Landa Agado. Delegita Reto. Societo Zamenhof (nur por membroj). Teatro.


**Merkredo, 26 julio** Tuttagaj ekskursoj. Kongresejo fermita.

**Ĵaŭdo, 27 julio** Libroservo. Libroj de la Jaro. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Esperantologia Konferenco. Korea ekspresе. Belartaj Konkursoj. E-kursoj. Centra Oficejo respondas. Urba Akcepto (por invititoj). Koncerto.

**Vendredo, 28 julio** Libroservo. Komitato de UEA. IKU-prelegoj. E-kursoj. Faka Forumo. Aŭkcio. Venontaj UK-oj. Internacia Arta Vespero.

**Sabato, 29 julio** Solena Fermo (10h00). Libroservo (ĝis 14h00). Fermo de la kongresejo (14h00)

# La 73-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO






## Togolando, Aneho

## 5 – 12 de aŭgusto 2017

# Ĝenerala temo de IJK-73

## Virinoj kaj viroj kun siaj kulturoj

Kiel esperantistoj, ni parolas pri kulturoj ofte: plej ofte pri kulturoj naciaj, popolaj, etnaj. La ĉi-jara kongresa temo celas pliriĉigi tiun ĉi diskuton je pliaj dimensioj, ĉefe je tiu de genro. Kulturoj nome ne ekzistas en vakuo – male, ili estas en konstanta interago unu kun la alia, kaj kun la diversaj aksoj de niaj identecoj, kiel ekzemple genro. Ni do parolos ne nur pri diversaj popolaj kulturoj, sed ankaŭ, interalie, pri kulturoj inaj kaj viraj, kaj pri la multaj nuancoj kaj intersekcoj ekzistantaj inter ili.


# Aneho –
# la kongresloko
# de IJK-73












IJK2017
ANEHOTOGOLANDO

# Emblemo de IJK-73

IJK2017

ANEHOTOGOLANDO

# Rusiaj Esperanto-Tagoj 2017

## Poŝeĥonjo, Jaroslavla Provinco




## 2 – 9 de aŭgusto 2017

# Temo de RET-2017

# Idea,
# filozofia
# kaj religia fono de
# Esperanto


# RET-2017

**Ret -2017**
**estas dediĉita al la**
**140-jariĝo**
**de Ivan Ŝirjaev —**
**rusa esperantisto,**
**verkisto,**
**pastro**




**(1877 – 1933)**

# Ivan Ŝirjaev









# Poŝeĥonjo (1777)









# Loko de RET-2017

**Ripozejo «Strangula Korto» (Чудной двор) en Poŝeĥonjo, surborde de Ribinska akvorezervejo. En la teritorio situas duetaĝa restoracio, 2 rusaj vaporbanejoj, sportejo, plaĝo, laŭboj, luejo de bicikloj, saŭno ktp.**



# Strangula korto










# Provizora programo

- REU-Konferenco,
- Somera universitato
- "Unuaj Lego-Tagoj omaĝe al I. Ŝirjaev" kun vizito al lokoj, kie li diservis
- Diversnivelaj kursoj
- Diskutoj ĉe Ronda tablo
- Diverstemaj seminarioj kaj metiejoj
- Peĉa kuĉo
- Ekskursoj al la urboj Tutajev, Jaroslavl kaj Ribinsk
- Distraj vesperaj programoj kaj koncertoj



**Por interesiĝantoj antaŭ RET estas proponata speciala religia programo "Ortodoksa kunumado" inter la 27.07 – 01.08 kun vizitoj de preĝejoj, diservoj en kelkaj urboj, partopreno en festa kruca procesio en la urbo Tutajev laŭ la bordo de Volgo. La detalan informon bonvolu peti ĉe pastro-monaĥo Taŭriono: ilija@yandex.ru**

**Agrablan, eventoriĉan, belan someron al vi ĉiuj!**




**Ne forgesu Esperanton!**